Jaro III/VII. 2 N-o (26) Novembro 1925

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
Fondita en 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

Elio Erenburg: Kafejo "La borso". Trad. *Godeo.* — *J. Lilienbach:* Trankviligite. Trad. *Joto.* — *J. Kovczak:* La animo de kapitalisto. Trad. *Zagrobski.* — *S. Davidov:* SAT-marŝo. — *Maksim Krjukov:* Pensoj pri lingvoj. — *N. P. Evstiféieff:* Ekzercoj kontraŭ "oz". — *G. Demidjuk:* Iom pri glavoj kaj plugiloj. — *P. Blonski:* Laborlernejo — kio ĝi estas?

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Ni faras proponon al nia legantaro.

Tiu propono jam delonge ĝermis ĉe ni. Ni jam estis farantaj esplorpaŝojn por vidi, ĉu estas preta la grundo por ĝi.

Niaj malnovaj legantoj certe memoras nian enketon, per kiu ni celis ekscii opiniojn de niaj legantoj pri la revuo kaj ĉefe — ekscii, kio kaj kiaj temoj interesas ilin. Ni atendis el la enketrespondoj tiri iajn kamaradajn direktivojn por nia redakta laboro.

La enketo ne havis brilan sukceson — ne multaj kamaradoj respondis al ĝi. Per la enketo ni ne sukcesis intime ekkoni nian tutan legantaron, eĉ ne pliparton de ĝi.

Tamen — kontakton kun la legantaro ni devas starigi en iu ajn formo.

La celo de nia redakta laboro estas doni al vi per la revuo respondojn al tiuj problemoj, kiuj vin interesas!

Se per la literatura parto ni celas doni al la legantaro certan distraĵon, do la paĝoj de popular-sciencaj kaj pedagogiaj artikoloj ne povas prezenti tian ripozon kaj distron. Ili postulas almenaŭ iom pli da cerbostreĉo . . . kaj eble — kial ne? — kelkaj niaj legantoj . . . eble eĉ multaj . . . ne ĉiam legas tiujn paĝojn. Kaj tiel duono de la revuo restas kvazaŭ superflua!

Aliel aspektus la afero, se tiuj du fakoj (la scienca kaj la pedagogia) enhavus artikolojn, kiuj estus verkitaj responde al certaj demandoj de niaj legantoj. Tio estas ja aranĝebla: la legantoj sendu al la redakcio siajn demandojn, kiujn naskas la tralegitaj en nia revuo artikoloj aŭ pri kiuj ili volus legi en nia revuo.

Ekzemple:


— Kiamaniere oni esploras la atmosferon?
— Kio estas spektra analizo?
— Kial la nuna lernejo ne sukcesas prepari por la vivo?

Tiujn demandojn ni publikigos en nia redakcia angulo, proponante al niaj kunlaborantoj verki mallongajn, sed klarajn, kompreneblajn por ĉiu respond-artikolojn. Samtempe ni instigos aparte kamaradojn, kompetentajn pri tiuj temoj.

Certe, tio ne signifas, ke niaj kunlaborantoj ĉesu verki pri la temoj, kiujn trovas ilia propra iniciato. Tiuj artikoloj ja donos materialon por novaj demandoj de legantaro. Ĉu ne?

Do ni provu tiun vojon. Ne estu indiferentaj pri nia revuo! Refoje ni vokas: kunlaboru per verkoj, kunlaboru per demandoj, nur ne restu pasivaj!

— Ne restu pasivaj!!! *La Redakcio.*



KAFEJO “LA BORSO”

ELIO ERENBURG

— Aĉetu 280 “Meksiko-Plateno“.
— Ili leviĝis je du punktoj — 320!
— Tute egale — aĉetu!
— Estas elĵetita por vendo nova porcio da ili!
— Ha-ha! Lakso post ĵurnala ricin-oleo. Bonege. Aĉetu.
— 328.
— Aĉetu!
— 355!

Kiel konfuziĝis meze de tiuj ĉi ciferoj la simpla glaso da kafo.

Ĝi nek leviĝadis, nek faladis, ĝi modeste staris, ĝi kostis unu frankon hodiaŭ, hieraŭ, morgaŭ — la dekoracia glaso, ne la trinkaĵo — sed la bileto, rajtiganta resti tie ĉi, en la embusko, meze de speguloj kaj rondĉapoj.

Cetere, kiu maltrankviliĝu pro la kafo? Ekzistas ja pseŭdonomoj ... Kafejo sen kafo, kafejo kun akcioj de kafo, samkiel kun akcioj de cemento, de plateno, de fervojoj, fosfato, bankoj, de nafto, kinouzinoj, de kotono.

Multaj miloj da kilometroj de la fervojo “Kanado-Pacifiko“ kune kun la tritiko, bubaloj, neĝoj, domegoj, kino-aktoroj kaj kun sifilisaj indianoj, — facile lokiĝas en la malgranda kafejo “La Borso“.

La dekoraĵo estas ordinara. Cent glasoj da kafo! Ĝia gusto al nenio estas konata. Eble — ĝi estas kolorigita akvo, eble — veneno.

Raŭkvoĉa de l'infanaĝo orakolo (radio-akceptilo). Folietoj. Skribplumoj. Telefonoj. Ŝvitaj internaĵoj de la rondĉapoj. Trusto de ĉeklibretoj.

Gratuloj rapidecaj. Iafoje larmoj en necesejo.

Lakeoj, ankaŭ malrespektantaj la kafon kaj ŝanĝantaj la trinkmonon je malgrandaj akcioj de suspektinda belga societo "Kongo-Ivuar". Aĉa kafejo! Tamen — ĝi estas administrejo de la planedo. "Suezo 9.450".

Sed kio okazis al "Meksiko-Plateno"? Ĉu oni estis forvendantaj ĝin? Ĉu oni serĉis aĉeti ĝin?

La ĵurnalo "Belga Stelo" komunikis — fiasko.

La revuisto de l' ĵurnalo "Vespero" ridetis — mistifikado.

215? Tio estis je la dekunua. Kaj je la tria la prezo atingis 365. La tago de plateno.

Kiel ĝi aspektas? Ŝajne, ĝi estas griza, simile al arĝento.

Kiu ĝin bezonas? Malsaĝa demando. En la kafejo "La Borso" ne estis la griza metalo, ne estis ankaŭ Meksiko. Estis la ciferoj. Kaj la ciferoj maltrankvilis. Malario. Konsterniĝo de la rondĉapoj. Senfortiĝo. Lukto.

En la angulo, apud la kaso, sidis unu el la luktantoj, li ne havis lukt-vestaĵon — ĉu decas luktvestaĵo por kavaliro de "ordeno de Leopoldo", por la prezidanto de Komerca Ĉambro — s-ro Aŭgusto Terlink.

La malvigla rondaĵo de la vizaĝo, malabunda hararo senkolora, la kolumo n-o 43, ŝlimaĵoj de la okuloj, rondĉapo — al kiu ekplaĉus tiu modelo?

Tamen li havis ankaŭ la spiriton; tiu flugetis super lia rondĉapo, tremetis per siaj flugiloj.

La spirito havis nomon Petro Mokel. Oficiale li estis konsiderata sekretario de s-ro Aŭgusto Terlink, sed la sekeco de terminoj transdonas la verajn funkciojn.

Lia voĉo superis krietadon de cent telefonoj. Liaj ruze movetiĝantaj oreloj estis antenoj, kaptantaj ĉiun ŝanĝon ĉe la Pariza aŭ Londona borso.

La sekretario subtenis la animon de la kvalito de "Leopold-ordeno", pretan kliniĝi antaŭ la ĉas-kriegado de la kafejo "La Borso".

Ja eĉ la kafaj glasoj, tiuj ĉi malrespektindaj statistoj, eĉ ili mirigite sonbruis.

— Kio? Aŭgusto Terlink aĉetis la akciojn "Meksiko-Plateno"? Sed ja generalo Hondures plene detruis la minejojn. Anarkio. Pereo. La akcioj falegis de sur la gigant-domo de la Nov-Jorka borso. Morgaŭ ili ne estos taksataj. Ili estas jam kvazaŭ rusaj pruntakcioj!

Stefano Terlink, kvankam juna, sed saĝa, Stefano Terlink elĵetas por vendo la akciojn "Meksiko-Plateno". Li elĵetas ilin kvazaŭ cigaredrestaĵojn el cindrujo, kvazaŭ oranĝo-ŝelojn, kvazaŭ amleterojn de amatinoj — rapidece, afereme.

Kaj lia pliaĝa frato, la kavaliro de l' ordeno, elprenas ĉiujn ŝparaĵojn, ruĝiĝas kaj pretas disŝiriĝi, aĉetante ĉi paperaĉojn.

Kiu estis tiu generalo Hondures? Hondures estas naskita de genia poeto, de Petro Mokel, naskita hieraŭ nokte... Tss! Sed neniu Hondures ekzistas. Ekzistas mito kaj aĉetado de akcioj. La telegramoj el Meksiko kaj Londono estas verkitaj rapidece de la sekretario de s-ro Aŭgusto Terlink.

Ha, tiu ĉi bona onklo Hondures manĝigos multajn! Antaŭ ĉio Aŭguston Terlink mem. Temas kompreneble ne pri la fazanoj.

Tie ĉi estas enmiksita la koro!

Se la vetaĵo estas — Meksiko kaj Plateno, do la gajno estas.... Ao, hindino el muzik-halo, kiu kisas serpentojn kaj silentas, Ao, longvizaĝa Ao kun la koloro de fulmanta mateniĝo, kun la mamo bruneta kaj malĝoja, la amatino de Stefano Terlink — frato de Aŭgusto.

Belega Ao!

Kaptante akci-pecojn de "Meksiko-Plateno", Aŭgusto kvazaŭ estis proksimiganta al siaj ŝveletintaj vangoj tiujn ĉi fruktojn de paradizo.

Generalo Hondures, la elpensita generalo, la nevidebla gvidanto de la ŝvitantaj makleristoj, por la kavaliro de "Leopold-ordeno" samsignifis kun la muta hindino Ao!

Tiel opiniis s-ro Aŭgusto Terlink. Li estis trankvila kiel kinoreĝisoro, organizinta mond-renverson.

La batalo postulis ne nur kuraĝon, sed ankaŭ saĝoruzon, ŝajnigitan apation.

Dum tuta horo agoniintaj akcioj "Meksiko-Plateno" rekonsciiĝis, eĉ ekprovis afektece pufiĝi.

La kreto skribis — "385".

Tiam do s-ro Aŭgusto Terlink faris la ruzaĵon! Li ŝajnigis, ke la mamojn de Ao li tute ne bezonas.

Ĉu ne sufiĉas knabinoj en Bruselo?

Kvazaŭ tranĉeo antaŭ atako, mallaŭtiĝis la kafejo "La Borso".

Meze de la silento peze knaris la koro de l' ordena kavaliro. Ĉiu minuto de pacienco estis alportanta milojn da frankoj.

La akcioj "Meksiko-Plateno" estis publike mortantaj. Aŭdinte la prezon "180", s-ro Aŭgusto Terlink ne eltenis. Li leviĝis:

— Aĉetu 120 po 180!

Je 15 metroj de la venkinto sidis la venkito.

La sama kafejo. La samaj manieroj, la sama nomo — Terlink, Terlink la malpliaĝa, Stefano Terlink, tiu, kies saĝo estas de ĉiuj taksita, ti-kiu havas la hindinon el muzik-halo.

— Ha-ha-ha! La malsaĝulo Stefano! Li ekkredis je generalo Hondures! Li ne pripensis, ke la anarkio kaj la fiasko — ĉio ĉi estas la elpensaĵoj de ruza Mokel! Li forvendis ĉiujn akciojn "Meksiko-Plateno".



Kaj Stefano estis ridetanta! Jes, jes, vendinte "Meksiko-Platenon" (hieraŭ ankoraŭ 405) po 280, eĉ po 200, eĉ po 180, li tamen sukcesis rideti per la rideto, simila al la rideto de Aŭgusto Terlink, kiel du milfrankaj monbiletoj.

Neniigita, li ŝajne konsideris sin esti venkinta.

Aŭgusto serĉis ne la malsaĝan rideton de la frato, sed la longvizaĝan Ao.

Li vidis ŝin. Li ŝin ne vidis.

Fine, li difinis ŝian lokon — kiel ĉiam, apude kun Stefano. Ŝi silentas.

Ao!

Aŭgusto ŝin perlaboris!

Aŭgusto venkis! 15 metroj, dividintaj lin de la frato, ripetis la enveturon de la reĝo Albreĥto en Bruselon. Li estis paŝanta malrapide.

— Hondures? Hondures ne ekzistas! Nun, kiam la operacio estas finita, oni povas pri tio diri malkaŝe.

Ekzistas la malsaĝa Stefano, forvendinta kontraŭ okdek-kvin miloj la akciojn, kiuj kostas pli ol sescent. Ĉu klaras?

Ekzistas Aŭgusto, la saĝulo Aŭgusto, la kavaliro de l' ordeno, la prezidanto de komerc-ĉambro. Duonmilionon li perlaboris, svingetante per la skribplumo super la franka glaso da kafo. Ekzistas ankoraŭ Ao, ne la homo, sed — plateno, akcioj, dividendo.

— Aŭskultu, Stefano, fordonu al mi la virinon! Fordonu al mi Aon!

Silento.

— Ci perdis ĉirkaŭ duonmiliono. Mi scias, ci havas saĝon, ci havas grandan saĝon, kial ni parolu longe — nian, de Terlinkoj, saĝon. Kun ĝi ci ne pereos. Sed ci verŝajne nun bezonas monon. Fordonu al mi Aon!

Silento.

— Ci obstinas! Mi scias. Tiu obstino — estas nia obstino, de Terlinkoj! Mi ankaŭ estas obstina. Mi volas Aon! Mi povus simple

forlogi ŝin kiel katinon. Sed ni estas — fratoj. Ni ne devas trompi unu la alian. Kiom ci volas por ŝi!

Stefano Terlink daŭrigis silenti. Silentis ankaŭ Ao. Ŝi rigardis en la profundon de la speguloj, kie malrapide flugetis fumo de la cigaroj. La taksado de la koro de Ao ŝin ne interesis.

— Akcioj — ĉu ci deziras akciojn? Mi ne havas liberan monon! Dek miloj — bagatelo nur. Kaj la cetero — "Meksiko-plateno". Mi donos al ci cent akciojn. Ĉu valoras tiom ĉi virino el muzik-halo? Ŝi ne scipovas eĉ vesti ĉapelon. Tio estas mia obstino, nia, de Terlinkoj — mi volas ŝin! 100 akcioj. Morgaŭ ili estos po 500. Ja ci sciu Stefano... La fratoj povas paroli malkaŝe inter si. Li ne ekzistas! Ci aŭdas min, li ne ekzistas! Ĉio estas nur trompo!

Stefano ekridetis:

— Ni estas edukitaj en bona katolika familio. Kiamaniere do ci povas dubi pri lia ekzisto?

— Ho, Stefano!... Ĉu ci ŝercas? Certe li ekzistas. Tion scias ĉiuj. Sed mi parolas pri aliu. Mi parolas pri Hondures. Li ne ekzistas, Stefano.

"Hondures ne ekzistas"! — ja ĉe tiuj vortoj Stefano Terlink devus ekkrii, ekplori, frapi Kainon. Tamen, li konservis la rideton kaj same maldiligente ekmurmuris:

— Bone! Prenu ŝin! Ŝi ne estas bezona al mi! Donu al mi dek milojn — ili taŭgos por cigaredoj. Akciojn mi ne prenos. Kial mi rabu cin? Ci diris la veron, Aŭgusto, — ni estas fratoj, ni — Terlinkoj, ni devas helpi unu al la alia.

Estis la malfrua horo de krepusko, la horo de rendevuoj ĉe tramhaltoj, la horo de la ĵurnalo "Vespero", de necerta paŝmaniero kaj de amo.

La kafejo "La Borso" estis rapide malpleniĝanta. Ricevinte dek milojn, foriris ankaŭ Stefano Terlink, perdinta kune kun la plateno la malĝojajn fruktojn de paradizo, la brunetajn mamojn de Ao.

Aŭgusto mendis botelon da ĉampanvino. Du glasoj...

— Por la revo de poeto, por la nenaskiĝinta generalo Hondures! Por mia saĝo kaj por la koro de mia frato Stefano, por ciaj brunetaj mámoj, por la allogaĵo de serpentoj kaj Terlinkoj, por cia silento, Ao!

La hindino ne ektuŝis la pokalon. Al ŝiaj oreloj — konkoj, plenigitaj per bruo de akvo kaj de jaroj, — fremdis la toastoj.

Kiu estas apude de ŝi? — ĉu ne estas tute egale?

Ŝi estis fordonanta sian varmon kaj sopiron al la nevidata serpento.

Ŝi estis metita, kiel valora aĉetaĵo, en la aŭtomobilon de s-ro Aŭgusto Terlink, kaj, spirrompante pro pasio, la motoro ekkuris al la duonnokta Edeno de hotelĉambroj, de kurtenoj kaj de sofoj, kie la fruktoj de Ao povis balanciĝi ĝis la mateno...

Kiel ĉiam, Aŭgusto Terlink sin direktis al la kafejo "La Borso".

Por veki la envion de Stefano — li prenis ankaŭ Aon, samkiel la pinklon de sia kravato, samkiel la signon de sia ordeno — ĉiuj do

vidu. Kiam ekturniĝis la spekulo de la pordo, tiu ĉi labirinto de vitro kaj de malespero, la hindino eniĝis en la profundon, kie dumjare kolektiĝas la fumo, malbrila lumado, la voluptaj movoj de serpento.

— Fiasko de "Meksiko-Plateno"! Nov-Jorko — paritato 40! Tie ĉi je la deka 56, je la dekunua — 34!

La arto — grandaj estas ĝiaj sorĉoj, la belo de la nevideblaj mamoj de Ao (li eĉ nokte ne vidis ilin — la lumo estis estingita, la serpento estis kurbiĝanta sur la supozataj floroj de tapiŝo), la elpensaĵoj de Petro Mokel! Sekve, la tuta mondo ekkredis je sinjoro Hondures.

Tamen, sufiĉas! Nun tio ne estas necesa. Nun tio estas eĉ malutila.

S-ro Aŭgusto Terlink alvokis la sekretarion:

— Donu refuton. Jam estas tempo likvidi.

Petro Mokel, la spirito, kiu devis flugeti super la mastra pasto, suspekte ekridetis:

— Bedaŭre tio ne estas ebla, s-ro Terlink.

— Kiel do "ne estas ebla"? Diablo prenu! Ni lin elpensis, ni lin ankaŭ finos. Ja Hondures...

Dolĉe, simile al jezuito, pruvanta al malvarmiĝema junulo ekzistadon de Lucifero, la sekretario elektis la bezonan verbon.

— ... ekzistas.

Ĉu estas viva s-ro Aŭgusto Terlink? Kie estas li? Glasoj? Kafejo "La Borso"? Kavaliro de la ordeno? Eble, ĉio ĉi estas sonĝo, inflamo de cerbo, 41-grada temperaturo, mondpereo? Malespere sin ĵetis la flamanta bovo, pikita de la dubo, al la paroltubo de radioakceptilo.

La orelo ĉerpis voĉojn de la universo.

— En Zagreb — arestoj. "Maroko" — 318! Ekscitiĝoj en Damasko. Dolaro en Parizo — 19,41. Daves-plano. Financa reformo en Aŭstrio. Generalo Hondures...

Halt! Silentu, babilema ĉikanulo de kvar kontinentoj! Kial nur por viaj ĉikanoj estas elpensita tiu ĉi elektra babililo?

Aŭgusto ŝanceliĝas. Aŭgusto kaptas glason da kafo, la malrespektatan glason, fine rekonitan. Pluen!

— Generalo Hondures ricevis subtenon. Intrigoj de Vaŝingtono. "Plateno-Johanisburgo" multe leviĝas. "Meksiko-Plateno" hodiaŭ ne estis borstaksata".

Mallaŭtiĝu! Se ekzistas generalo Hondures — s-ro Aŭgusto Terlink ne povas ekzisti. La dividlinio inter realo kaj sonĝo estas forlavita. La posedaĵo estas malgajnita!

Peze puriginte la nazon, Aŭgusto aliris Stefanon. Ili ŝanĝis la rolojn — Kaino fariĝis Avelo, la akcioj "Meksiko-Plateno" — kun vundo en la brusto.

— Ci superruzis min, Stefano. Ci eksciis, ke Hondures ekzistas! Ci ekdeziris forvendi la neniom valorantajn akciojn. Ci elektis por tio mian sekretarion! Ci sugestis al mi, ke vero — estas la elpensaĵo.

— Kial ni ekscitiĝu? Ja ci volis sugesti al mi, ke elpensaĵo — estas la vero. Ni ambaŭ estas pravaj. Kiu scias, kie estas la vivo kaj kie la sonĝo? Eble, Hondures aperis post kiam ci decidis elpensi lin?

— Silentu! Mi ne jam freneziĝis. Mi ne volas freneziĝi. Redonu al mi almenaŭ 10 mil!

Ni estas kvitaj. Ci prenis Aon.

La mamoj de la hindino aperis el la abismo de l' speguloj. Aŭgusto ekmeditis. Eble ne ĉio estas perdita en tiu ĉi interŝanĝo?

Jes, ni estas kvitaj, Stefano! Ci vendis al mi la amon, ci vendis al mi la mamojn de Ao, kvazaŭ ili estus akcioj de fosfato aŭ de nafto.

Tiam Stefano Terlink senŝerce ofendiĝis. La komerco — estas nobla afero. Kvalito de la varo ne povas maldignigi la negocanton. Kiel do rajtas tiu ĉi malgajninta fripono ofendi lin?

— La amo? Hm... Kaj diru al mi, feliĉa Aŭgusto, ĉu ŝi nokte estingis lumon? Ĉu vere, ŝi nepre volis estingi lumon? Ci nenion respondas. Ci opinias, ke mi enmiksas min en cian intiman vivon? Ho, ne!... Mi nur avertas. Oni ne povas ŝin karesi! Mi estis kunprenanta ŝin kiel amuleton. Ŝi estis helpanta al mi en mia bors-ludo. Sed mi neniam ŝin tuŝis. Ŝia maldekstra mamo estas signita de blanka ornamo. Tio estas tre bela. Sed la fratoj povas inter si paroli malkaŝe. Ŝi estas malsana, Aŭgusto. Tropikaj ulceroj! Tio estas same ĝusta, kiel la pereo de l' minejoj "Meksiko-Plateno"...

Mallongigite elrusigis *Godeo*.

TRANKVILIGITE

J. LILIENBACH

Ni volas vivi.
Ili deziras al ni morton.
Ni penas leviĝi.
Ili supremas nin.
Ni volas lumon kaj aeron.
Ili blindigas kaj sufokas nin.
Ni serĉas veron.
Ili trompas nin.
Ni postulas justecon.
Ili rilatas maljuste al ni.
Ni deziras egalecon.
Ili defendas privilegiojn.
Ni vekas dormantojn.
Ili dormigas vekiĝantojn.
Ni incitas.
Ili trankviligas.
Ili tiras malantaŭen.
Ni puŝas antaŭen.
Ilin direktas propra bonfarto.
Nin gvidas altaj idealoj.
Ili serĉas subtenon de fiuloj.
Nin subtenas ĉiuj honestuloj.
Ili defendas la malnovon per ungoj kaj dentoj.
Ni penas radikalan renovigon.
Ili timigas nin per mortpuno.
Ni ne timas morton.
Ili flatas nin per promesoj.
Ni ne kredas ilin.
Ilin apartenas la estinteco.
Nin apartenas la estonteco.
Ili mortas. — Ni vivas.

El estona lingvo trad. *Joto*.

LA ANIMO DE KAPITALISTO

J. KORCZAK

Antaŭe mi miris, nun mi jam komprenas. Estis momentoj, kiam mi hezitis, hodiaŭ mi plu ne dubas.

Mi miris, kial kapitalisto ne disdonadas propravole sian havaĵon, kiu superas liajn bezonojn. Por kio povas servi sakegoj da oro kaj amaso da bankbiletoj, se li povas ilin nek digesti, nek eĉ formanĝi.

Mi pensis, ke se iu alparolus lin trankvile, senkolere kaj plenargumente, eble li konvinkus lin, — eble?

Fine okazis, ke mi ekkonis la animon de kapitalisto, kaj la iluzioj forflugis.

Mi ekkonis.

Ĉar mi mem, dum tri horoj, estis kapitalisto. Mi estis kapitalisto, — mi konfesas tion humile, — ĉar kiu el ni ne eraras, kiu estas senkulpa? — ho! la surtera vivado estas tiel plena da erarigaj vojoj, — tiel facile oni povas perdi la animon.

Okazis, ke lunde matene iu frapis mian pordon, — komence diskrete, poste pli laŭte, — komence perfingre, poste perpugne, — li ekmovis anson, klakis per anso — jes, mi konas tion: aŭ laviştino kun kalkulo, aŭ la domadministranto kun domgardisto kaj skandalo, aŭ knabo el la bakejo kun riproĉo.

Mi havis nek unu groŝon kaj decidis ŝajnigi dormon. Pro kio do trompi la esperojn de proksimuloj?

— Ĉu estas iu ĉi tie? mi aŭdis voĉon ne kolerantan, ne atakantan, eĉ sufiĉe trankvilan.

— Nu, do kio? — mi demandas tra la pordo.

— Ĉar mi havas leteron al vi.

Eble ia perfido?

— Lasu ĝin ĉe la domgardisto, — mi diris singardeme.

— Mi ne povas, en la letero estas mono.

Mono?

Multe mi havis en mia vivo da diversaj okazintaĵoj — agrablaj, pli ofte malagrablaj, — sed ke iu tute neatendita kaj nesupozita sendus al mi hejmen en letero monon?

Mi estas superstiĉa, mi ektimis.

ESTIMATA SINJORO!

Fondante la gazeton sub titolo "Ilustritaj stultaĵoj" kaj fidante je Via tre ŝatata kunlaborado, ni permesis al ni lokigi vian nomon sur la listo de konstantaj . . . ktp.
Je la konto de estontaj . . .

Kaj jen mi trovas kvin trirublajn monbiletojn, kiu faras sendube dekkvin rublojn.

Mi ekrektiĝis kaj ekrigardis la senditon ĝentile, kvankam froste. Antaŭ mi staris homo humila. Plue, mi ne sciis kion fari.

— Jes . . . Dekkvin rubloj . . . Jes . . . Sendube . . . Sendube . . .

Kaj nek unu vorteton pli. Tra la forpuŝita el ekvilibro cerbujo preterflugis fulmoj de frazoj:

— Iom da pacienco . . . Mi pagos en plej proksimaj tagoj . . . Ĝuste mi atendas pli grandan sumon . . .

Finfine mi nenion diris, kaj donis al la sendito unu trirublan bileton.

Li kliniĝis kaj rapide foriris.

Kaj jen la unua ektremo de la fremda, antaŭ momento inokulita kaj jam ĝermanta animo de posedanto:

— Mi donis tro multe. Mi agis senpripense. Mi perdis monbileton. Restis nur kvar kaj estis kvin. Kvin estas pli multe ol kvar.

— Atentu nur: mi havis nenian programon, projekton eĉ deziron, kiu pravigus la posedemon de mono, — mi bedaŭris la donitan monbileton nur pro la monbileto mem, — mi volis havi kvin, ne kvar, pli multe kaj ne pli malmulte kaj krome mi havis nek unu penson, nek unu deziron aŭ celon, kiu postulus ne kvar, sed kvin monbiletojn.

Kaj anstataŭ la ĝojo — aflikto, anstataŭ kontentiĝo — la malĝojo, anstataŭ konscio de bonfaro — sento de maljusto.

Doni al la sendito tri rublojn — kia frenezeco? Senditoj estas homoj demoraligitaj, degenerintaj, drinkuloj, diboĉuloj, ili ne kredas dion, ne amas patrujon, ne zorgas pri la familio.

Atentu nur: jam malŝato, jam hipokriteco, jam kalumnio.

Mi min vestis rapide, iris magazenon kaj aĉetis ledan monujon kun aluminiaj randoj, — trifakan, novan, odorantan, — vera ludileto. En ĉiun fakon mi metis unu verdan monbileton kaj lokiginte sonoretantajn monerojn en veŝtpoŝeton, mi vagadas sencele.

— Bonan tagon!

— Aaa . . .

Kolego-publicisto, kamarado, preskaŭ amiko.

— Nu, kien? — li demandas iomete trudeme.

— Kien? — li okulumis iomete suspekteme. — Do, kien? — li etendas manon kaj rigardas min esploreme.

Mi ekkomprenis: li estas sen groŝo kaj li volas prunti. Li ankaŭ volas preni, rabi kaj ruinigi min. Mi denove estos pli malriĉa je unu monbileto, — restos jam nur du, — en unu fako de la monujo estos malpleno, nigra abismo, — nenio, — sanga vundo, tombejo de io ŝatinta kaj perdita . . .

Mi saltis flanken, — li post mi, — mi forkuras, — mi kuras, — mia frunto ŝvitas, — la haroj leviĝas sur la kapo. Mi volas savi tri verdajn monbiletojn, por kiuj mi ja nenion volas aĉeti, neniun deziron kontentigi.

Kiam mi rekonsciiĝis, mi staris apud Vistulo. Mi rapide prenis el la poŝo la monujon kaj ĵetis ĝin en akvon. Kaj por la restintaj en la veŝtpoŝeto moneroj mi aĉetis kolbason kun brasiko.

Elpoligis *J. Zagrobski.*

SAT-MARŜO

S. DAVIDOV

Motivo de "Varŝavjanka"

Mondon plenigas proleta sufero.
Sangefestenas en mond' kapital' . . .
Levu standardojn de fajra libero,
Kamaradaro, en fina batal'!
Ekster limoj la de ajna nacio
Forĝu do ni unuecon de l' front'
Por tra ventegoj de l' revolucio
Marŝi kuraĝe al bela estont'!
(Rekantaĵo)

Kapitalismo senfrukte klopodas
Sklavojn disigi per mur' de naci'.
Ĉar la tutmondo baldaŭe eksplodos
Per dinamito de l' revoluci'!
Klason de burĝoj skuegas la ondoj!
Estas proksima jam ĝia disfal'.
Do unuiĝu proletoj tutmondaj,
Vicojn kunigu por lasta batal'!
(Rekantaĵo)

Gason preparas, mortigdinamiton
Kapitalistoj de ĉies naci' . . .
Ni al milito anoncas militon
Per neniigo de burĝa soci'.
Sennaciula tutmonda armeo
Forĝu al si unuecon de l' front'!
Marŝu kuraĝe al venk' de l' ideo,
Marŝu kuraĝe al bela estont'!
(Rekantaĵo)

Rekantaĵo:

Marŝu antaŭen, la avangardo!
Burĝojn ataku per ondoalbat'!
Per vicoj ardaj sub la standardo
Kun la kvinpinta emblemo de SAT!

PENSOJ PRI LINGVO

MAKSIM KRJUKOV

Se iu hodiaŭ diris, ke la lingvo ne bezonas ŝanĝojn, morgaŭ li nepre devas diri, ke la sociordo same ne bezonas reformojn.

Kresko de mondlingva movado plene respondas al fortiĝo de proletaro. Espo plej bone sukcesas en la landoj kun forta kaj revoluciema proletaro (Germanio, Sovetio, Francio). En kapitaliste forta Usono Espo estas same nepopulara kiel proletara revolucio. Esperantistoj tie estas same maloftaj kiel anoj de revoluciaj partioj. Sole revolucia komunista partio en Usono havas nur 10000 anojn plej parte ĵus migrintajn el Eŭropo!

Lingvo estas funkcio de sociordo, ŝanĝoj en lingvo kaj socio paralelas. Tial per ŝanĝoj en unu el ili vi tre facile kaj senerare povas juĝi pri ŝanĝoj en la dua. Se iu revolucio ne sekvigis reformojn en lingvo — ĝi nepre ne donis reformojn en homsocio, ĝi estis nur rikano de samklasaj hundoj, kiuj malpacis pro alloga osto. Revolucio sen ŝanĝoj en lingvo estas ekonomie senfrukta.

Ŝanĝoj en lingvo kaj en socio estas reciproke ligitaj. Tial kiu malemas al evoluo de socio, tiu psikologie malemas al evoluo de lingvo. Konservemo en lingvo kaj en politiko havas psikologian interligon. Rusa revolucio ĝin montras plej bone. Reakciaj registaroj de Denekin, Judeniĉ, Kolĉak, Semjonov — ĉiuj oficialis nur malnovan rusan ortografion eĉ post kiam ĝi estis dekrete simpligita de Sovetoj. Ĉiuj kontraŭuloj de Sovetoj ĝis nun malemas al nova ortografio kaj al novformaj mallongitaj vortoj, kiuj invadis rusan postrevolucian lingvon kaj penetris eĉ en poezion.

Eklezioj de ĉiuj kultoj estas plej reakciaj kaj konservemaj institucioj. Kaj ilia konservemo povas esti bone mezurita de ilia malnovlingvemo. En "paroloj" kun siaj dioj ili ĉiam praktikas antikvan lingvon. Katolikoj — latinan, ortodoksuloj — antikve slavan, hebreoj — lingvon de formortintaj paŝtistoj en Palestino, Mongoloj — antikvan tibetan lingvon ktp. Nova lingvo respegulas novajn sensinjorajn rilatojn inter homoj. Tial ĝi nature ne taŭgas por eklezio, kies esenco estas en sanktigo de malnovaj sklav-sinjoraj rilatoj inter socianoj. *Kolego Dio, sinjoro Krjukov* — ĉu ĝi ne estas blasfemo? Juĝu mem. — Ĉu moderna rusa lingvo, kiu tute ne uzas la vorton "sinjoro" kaj estas ozigita de milmiloj da teknikaj mallongigoj, taŭgas por dece esprimi primitivajn sentojn kaj interrilatojn de kreduloj?

Reformoj en eklezioj ĉiam kaj ĉie samiras reformojn en ilia lingvo. Uiklef en Anglio, Luter en Germanio, "vivistoj" en nova Rusio pruvas ĝin plej klare. Vivistoj (ruse "ĵivistoj") planas anstataŭi antikveslavan lingvon per pli nova rusa lingvo.

Germanoj, ĉu mi eraras skribante, ke ju pli konservema kaj reakcia estas via ĉiutaga gazeto, des pli ĝi emas al malnovformaj germanaj literoj, kreitaj de mezepokaj monaĥoj? Internacia latina (pli simpla kaj ekonomia) alfabeto en Germanio estas uzata nur en pli progesemaj rondoj.

Revolucio alportis al tataroj de SSSR reformon de ilia malnova araba nepraktika alfabeto. Ili penas enkonduki novan esperantsimilan alfabeton multe pli facilan. Kaj okazas mirindaĵo! Simplaj laboristoj kaj vilaĝanoj sin montris plej varmaj adeptoj de nova alfabetoj. Sed inteligentuloj-tataroj malamike rilatas al ĝi kaj defendas la malnovan araban. Ĝi estas fakto, kiun certigis prezidanto de Azerbejĝana respubliko Agamalov en sia raporto farita de li 21. majo en Instituto de orientistoj en Moskvo. Jen vi havas bonegan ilustraĵon de rolo de inteligentuloj en lingvaj demandoj.

Satanoj, penu kompreni kaŭzon de l' konduto de "inteligentuloj" en lingva fako, gardu vin kontraŭ ili kaj ne akuzu min pri demagogiemo, kiel faras bonintencaj redaktoroj de l' kazanja "Esperanto-hejme". Kaj ne pensu, ke viaj inteligentuloj, kiuj ĉirkaŭas vin kaj ĉiam pretendas vin gvidi, estas faritaj el alia pasto, malsimila al tiu de l' tataroj.

Ne streĉu vian okulon por vidi movon de lango en aŭtoritata buŝo de via ĉefulo, sed mem pensu kaj agu. Neniam forgesu, ke viaj ĉefuloj ofte perfidis vin pro diversaj kaŭzoj. Ili ofte tiras vin senkonscie malantaŭen. Do ne pensu, ke vian lingvan problemon solvos anstataŭ vi iu aŭtoritato aŭ lerta ĉefulo. Nenia aŭtoritato venos sen via volo kaj scio. Aŭtoritatoj aperas kaj agas nur pro instigo de ti-kiuj bezonas kaj aspiras ilin.

Sciencistoj estas nur pli malpli lertaj metiistoj en sia fako. Ili bone taŭgas nur por plenumi laboron menditan de l' mastro.

Sed la mastro ĝis nun estas burĝaro, kiu psikologie ne emas fari ĉi mendon. Jen kial profesiaj sciencistoj neniam okupis sin pri lingvo internacia (Zamenhof estis ne lingvisto, sed simpla kaj malriĉa okulisto; li loĝis en malriĉa strato, kies nomo — *Dzika, t. e. Sovaĝá* — bone aperigas lian socian staton).

"Ĝenerala lingvistiko" (sciencoza librego de diplomita sciencisto Tomson, profesoro de Odessa Universitato) sur paĝo 380 aplombe avertas: "Estas notinda fakto, ke kreon de lingvo internacia partoprenis nek unu lingvisto. Kaj nemultaj specialistoj kunsentas ĝin. Pri lingvo internacia sin okupas homoj, kiuj ne havas specialajn konojn en lingvistiko."

Rilate al nova rusa ortografio, kiun oficialigis Revolucio spite al Tomsonoj, la librego sur paĝo 428 deklaras: "La reformo estas neefektivigebla. Ĝia dekretigo aperigus post nelongedaŭra konfuzo en socio nur revenon de malnova ortografio."

Ĉu malnature ĉi sciencisto ekmalamis novan mastron kaj eksiĝinte vagas nun tra la mondo kaj siblas pri Sovetio!

EKZERCOJ KONTRAŬ "OZ"

N. P. Evstiféieff

I. PRI KULTUREBLA TERSUPRAĴO EN MEZA RUSLANDO

Centra parto de l' rusa lando ne similas al ĝia suda parto, kie la tersupraĵo konsistas ĉefe el "nigra" tero, el "huma" tavolo tre dika, kreita per putrintaj restaĵoj de l' riĉa kreskaĵaro.

En nia centro la tersupraĵo konsistas ordinare el "griza" tero, kiu estas ĉefe la diversproporcia miksaĵo de sablo kaj de argilo.


Sekve meza speco de l' tero en nia centro estas samtempe sablohava kaj argilhava. La tero ne enhavanta ambaŭ elementojn estas maloftaĵo kaj de diversa proporcio de ambaŭ ĉefaj elementoj dependas, ĉu oni nomas la teron "kunsabla" (ruse: "súpesj") aŭ "kunargila" (ruse: "suglinok").

Pure argila aŭ pure sabla tero tute ne taŭgas por agrikulturaj celoj.

La kunsabla ("súpesj") aŭ kunargila ("suglinok") estas nomata la tero *sufiĉe* riĉa de sablo aŭ de argilo, sed ne tro riĉa.

La sabloriĉa kaj la argilriĉa taŭgas ankaŭ por kelkaj specialaj kulturoj, sed kiam ĝi (la tero) alproksimiĝas laŭ siaj ecoj al specoj sabloplena aŭ argilplena ĝi pli malmulte distingiĝas de simple-sabla kaj argila, t. e. pure sabla aŭ argila sen iaj kompinaĵoj, almiksoj kaj aldonoj, — kaj ili estas netaŭgaj, kiel ni jam supre notis.

Jen ĉi-supraj klarigoj tabelforme:



Sekve, kiel ni vidas, sablohava tero povas esti sableca en diversaj gradoj esprimeblaj por jenaj 7 ŝtupesprimoj (laŭ pligrandiĝa ŝtuparo — "skalo"): argilplena, argilriĉa, kunargila, kunsabla, sabloriĉa, sabloplena, sabla . . . Oni subkomprenas generan nomon en formo de l' substantivo "sablotero", krom 7 cititaj specnomoj en formo de l' adjektivoj.

Tiel same argilhava tero povas esti argileca en diversaj gradoj, esprimeblaj per jenaj 7 ŝtupesprimoj: sabloplena, sabloriĉa, kunsabla, kunargila, argilriĉa, argilplena, argila . . . Oni havas sekve ankaŭ 7 specnomojn de l' argiltero en formo de adjektivoj kaj unu genernomon en formo de l' substantivo.

Se oni bezonas, oni povus uzi ankoraŭ 2 ŝtupesprimojn en formo de vortoj kunmetitaj kun "tro" (trosabla aŭ sablotroa, troargila aŭ argiltroa). De l' teknika vidpunkto tio povas esti aŭ iu grado mallarĝa "analitika" (ekz. *inter* "plena" kaj "pura") aŭ kontraŭe pli larĝa "sintetika", kombinanta (ekz. enhavanta 2 aŭ 3 ŝtupojn: "puran", "plenan" kaj eĉ "riĉan") . . . Kio do restas neesprimita aŭ neesprimebla?

Ŝajnas al ni, ke ĉio estas esprimata pli bone kaj pli precize ol iu ordinare ĝis nun bezonis! . . .

Se krom tio ni iam bezonos por iu speciala teknika celo formon "sabloza" aŭ "argiloza" ni uzos ĝin en la okazoj supredifinitaj, t. e. kiam la teknika bezono de klareco kaj precizeco ĝin postulos kaj la teknikistoj ĝin teknike (science kaj precize) difinos kaj trovos ĝian lokon krom aŭ en supreklarigita tabelo.

Dume do ni ĝin ne bezonis kaj se ni uzis ĝin ne precize, ne science, laŭokaze anstataŭ iu ajn el 9—10—11 supredonitaj formoj. —

Krom sablo kaj argilo ofte en diversaj kvantoj ĉeestas "humo" (nigraj traputrintaj restaĵoj de kreskaĵoj) kaj "kalko".

Ilia proporcio ne estas ĉe ni granda; tamen oni povas noti la teron, posedantan tiajn almiksaĵojn, humhava aŭ kalkhava, ĉar tiuj aldonoj ne atingas la lokon kaj la rolon de du ĉefaj elementoj — sablo kaj argilo.

Tial oni povas nur tre rilate uzi esprimojn — kalkriĉa aŭ kalkplena, ĉar tiam ĝi iĝos ne "griza" tero, sed "mergelo" ne kulturebla en nuna stato de nia agrokulturo, de nia agrotekniko.

Tiel same, se kvanto de "humo" (en nia klimato en formo de "turfo") estas tro granda, la tero iĝas "turfa", sekve ankaŭ ne "griza", ne taŭga por nia nuna agroteknika uzo.

La specialistoj povas konsenti antaŭ ĉio inter si por pli preciza difino, kiam uzi esprimojn "kunkalka" kaj "kunhuma" kaj kiam — "kalkhava" kaj

"humhava" por ne uzi ilin sendistinge. Tiam la specialistoj bezonos difini la limojn de $^0/_0$ % por ĉiu esprimo.

Se tio jam estas farita, despli bone!

Se ne, ni povas atendi ilin, ĉar ni ĉiam "estas pretaj", kiel veraj lingvaj pioniroj!

II. PRI LA VOJOJ EN MEZA RUSLANDO

Ĉefa malhelpo de ĉiu vojaĝanto, ĉu li vojaĝas piedire, ĉu li rajdas, ĉu li veturas per biciklo, konsistas el ŝtonoj dissemitaj sur tuta supraĵo de nia tero, kiuj difektas ofte ne sole ŝuojn kaj bendojn, sed eĉ piedojn kaj hufojn.

En Meza Ruslando oni apenaŭ trovos eĉ unu mallongan peceton da vojo, kiun oni rajtus nomi (pure) ŝtona, ĉar la tuta tersupraĵo konsistas el mola tavolo, sed ne el ŝtono.

Tamen ankaŭ estos malfacile montri regionon tute senŝtonan kaj, se oni trovos tian terpecon, ĝi sendube estas arte (kulture) senŝtonigita; tiel same kiel la plej artefaritaj vojoj (ŝoseoj) estas arte ŝtonigitaj, t. e. igitaj kunŝtonaj.

Se la ŝtonoj estas dispecigitaj, malgrandpecaj (laŭ speciala-teknika-kolektado kaj specigado), tiam ili ne malhelpas vojaĝadon, sed ni parolas pri ŝtonoj "naturaj" (krudaj), nek dispecigitaj intence, nek kalibritaj sisteme. Ilia ĉeesto laŭlonge de la vojo estas tre grava por vojaĝanto kaj tial oni bezonus eĉ en gvidlibroj regionaj distingi vojojn (kun)ŝtonigitajn ("ŝoseitajn" kaj "makadamitajn"), ŝtonajn (ne havantajn molan tavolon sur subtera ŝtonego) kaj senŝtonajn (t. e. ordinare senŝtonigitajn, kelkfoje krom tio sabligitajn).

Sed tio estas esceptaj tipoj. Pli ordinaraj kaj kutimaj ĉe ni estas kunŝtonaj, t. e. tiaj, kiaj posedas certan kvanton da ŝtonoj nature ĉeestantaj sur la loko.

Ilia oportuneco aŭ maloportuneco dependas de l' ofteco aŭ malofteco de l' ŝtonoj, kiu povas esti esprimita per diverse nuancitaj esprimoj, ekz.:

"ŝtonhava" = la vojo posedas apartajn ŝtonojn ne forigitajn de sia surfaco, sed ili ne malhelpas la rapidan movadon;

"ŝtonriĉa" = la vojo iĝas maloportuna, ĉar la movado iĝas malfacila;

"ŝtonplena" = la vojo estas preskaŭ barita, ĉar, kiam la vojo estas *plena* de ŝtonoj, tiam la regula antaŭenmovado iĝas preskaŭ neebla...

Sekve: ne timu la vojon "ŝtonhavan", evitu "ŝtonriĉan" kaj ne risku "ŝtonplenan"!

Sed, kiel agi sur vojo "ŝtonoza", mi vere ne scius!...

Rimarko: Oni ankaŭ ne rajtas diri, ke sur kunsabla ("sabloza") vojo oni ne povas bone veturi sur biciklo, ĉar se la vojo estus sensabla, t. e. plej ofte pure argila, ĝi estus tute ne veturebla kaj tial ofte eĉ intence oni sabligas la vojon por igi ĝin pli facile kaj agrable marŝebla kaj veturebla. Ĉio do dependas de l' proporcio de argileco kaj de sableco, kiuj ne estas esprimeblaj per sola sufikso "oz"...


IOM PRI GLAVOJ KAJ PLUGILOJ

TEKNIKEMA KONVERSACIO

G. DEMIDJUK

Ne ripetu simple la evangeliajn vortojn: "Transforĝu glavojn en plugilojn", sed penu koncepti, ke ŝtalo pli utilas en plugilo, ol en glavo.

La apuda bildo certe povas multajn k-dojn interesi — ja la fotografo lerte kaptis per sia foto-objektivo precize la momenton, en kiu pro efiko de eksplodo okazas detruiĝo de la fabrik-tubo je kelkaj partoj. Verŝajne ĉe multaj la bildo naskas la demandon — kiome gigantan, detruan forton posedas do la eksplodaĵo?



Ĉe la aliaj eble la ekkrion — jen la detruaj rezultoj de la glorata teknika progreso!

Sed la bildo ne rakontas ĉion, kaj la historio de la fabrik-tuba eksplodo estas multe pli proza.

Ĝi ne staris en regiono de milit-agoj por esti detruita militcele. Ĝia eksplodigo okazis tute ne dum milito kaj eĉ ne dum revolucia batalo. Ĝi estis ordinara uzina tubo, dum kelkaj jaroj taŭge plenuminta sian destinon. Sed pro la tempodaŭro, aŭ pro iuj grundaj deformiĝoj, en la fundamento de l' tubo aperis fendo, la tubo mem pro tio iom kliniĝis, minacante per falo sur la apudan konstruaĵon.

Necesis faligi la tubon, sed estas klare, ke pro la aperinta ĝia kliniĝo la falo nepre okazus sur la apudan konstruaĵon kaj detruus ĝin.

Kaj jen helpe venis eksplodaĵo kaj la eksplodmetodo. La tubo per du eksplodoj estis faligita, kaj, disŝutiĝinte je partoj, la tubo falis precize sur sian bazon, tute ne difektinte la konstruaĵon minacitan.

Kiamaniere tio estis atingita? Sufiĉe simple — per la unua eksplodo oni faris en la tubo-fundamento fendon, kiu efikis kontraŭpeze al la unua, la natura, fendo kaj tiamaniere la kliniĝo de l' tubo estis nuligita. Restis do per la dua eksplodo dispecigi la tubon, ke ĝi falu sur sian bazon. La bildo montras kiel sukcese plenumis ĉi taskon la eksplodo.

Hazardo ne ludis grandan rolon en ĉio ĉi. La kvanto da eksplodaĵo por ĉiu eksplodo estis precize kalkulita kaj la efiko de ambaŭ eksplodoj estis antaŭe precize konita, ĉar . . . ĉar eksplodaĵo estas unu el perfektaj laboriloj, plene subigebla al homaj bezonoj, ĉar ĝi estas unu el sufiĉe precizaj iloj de laboro.

Por pli klare kompreni tion, ni forgesu por kelkaj momentoj nian tubon kaj analizu kelkajn fenomenojn, bone konatajn al ni.

En via ĉambro lumas elektra lampeto. Ĝi lumas pro tio, ke elektra fluo varmigas kaj lumigas la metalfadenon de la lampeto. La elektra fluo aperas pro tio, ke ĝin produktas dinamomaŝino. La dinamomaŝino siaflanke estas movigata de vapormaŝino aŭ de naft- aŭ benzinmotoro. Kaj fine la lastaj funkcias nur ĉar en ili estas bruligata ligno, karbo, aŭ benzino.

En tiu ciklo antaŭ ni okazas jena serio da procedoj: bruligata karbo brulas (t. e. ĝia ĉefa konsistparto — la kemia elemento *karbono* kemie komponiĝas kun *oksigeno* de la aero) kaj produktas varmon; ĉi lasta vaporigas akvon kaj ties vaporo movigas piŝton de l' vapormaŝino. Atentu — la varmo de karba brulado transformiĝas en movforton de l' vapormaŝino. Nun la lasta funkciigas la dinamomaŝinon, kiu produktas elektrofluon. Refoje atentu —



movforto de la vapormaŝino transformiĝas en elektron. Fine ĉi lasta, trairante la lampetan metalfadenon, varmigas ĝin ĝis la stato de lumado. Sekve — *la elektro transformiĝis ree en varmon.*

Varmon kaj elektron ni nomas — diversaj formoj de energio. La energio povas transformiĝi en sia formo, sed ĝi ne povas aperi senkaŭze, same ĝi ne povas neniiĝi.

El kio do aperas la varmo dum brulado de karbo? Estante energio, varmo ja ne povas aperi el nenio, nepre devas esti iu formo de energio, kiu dum brulado de karbo transformiĝas en la varmoformon de energio. Tiu formo estas la *kemia energio.* Dum la kemia procedo de brulado ĝi transformiĝas en varmon.

Nun ni revenu al eksplodaĵoj. Eksplodaĵo estas kemia komponaĵo ordinare de kelkaj ŝtofoj, plej ofte kun partopreno de nitrogena acido. Ekzemple,

piroksilino estas kemia komponaĵo de purigita kotono kun nitrogena acido. La ĉefa eksplodiva konsistparto de multspecaj *dinamitoj* estas *nitroglicerino* — la kemia komponaĵo de glicerino kun nitrogena acido.


Kaj jen la suprenomitaj ŝtofoj — piroksilino, nitroglicerino estas ĝuste la ŝtofoj, tre riĉaj je kemia energio, kiu kapablas en certaj kondiĉoj transformiĝi dum sia malkomponiĝo en varmoenergion. Ilian malkomponiĝon sekvas grandkvanta apero de gasoj, kiuj ĉe tre alta temperaturo, produktata de la eligata varmo, rapide disvastigas sian amplekson kaj kapablas fari certan laboron.

Tia rapidege okazanta transformiĝo de ŝtofoj en gasojn kun samtempe grandkvante eliĝanta varmoenergio estas nomata — *eksplodo*. La eksplodgasoj transformigas la varmoenergion en movforton, sekve ili kapablas fari certan laboron. Ĉar la kvanto da eksplodŝtofo estas regulebla, t. e ni povas ĝin pligrandigi aŭ malpligrandigi — estas regulebla ankaŭ la rezultanta el eksplodo kvanto da laboro.

En aeroplana aŭ aŭtomobila motoro estas eksplodigataj tre malgrandaj kvantoj da benzino, kiuj sufiĉas por movigi piŝton de la motoro, sed ne sufiĉas por detrui la cilindron, en kiu la piŝto moviĝas. Kaj aliflanke ni scias bone, ke per eksplodo oni povas detrui grandajn kaj fortikajn konstruaĵojn, uzante por tio necesan, precize elkalkuleblan, kvanton da eksplodaĵo. Sekve oni povas diferencigi, reguligi, modifi la eksplodforton inter la efiko de gramoj, eĉ onoj da gramo — kiel minimumo, kaj multaj tunoj, eĉ miltunoj da eksplodaĵo — kiel maksimumo.

Tion ni ilustru ankoraŭ per kelkaj bildoj.

Antaŭ vi denove estas laboraĵo de lerta fotografo: vi vidas sur la bildo (2) precize kaptitan momenton de eksplodo. Estas eksplodigata ordinara tero, kies pecoj formas tiun ĉi belan faskon. Ĉirkaŭe de la eksplodo vi vidas dispecigitan teraĵon, sed vi ne trovas iujn ajn kavojn, kiujn vi rajtus atendi memorante la kavegojn, faratajn de eksplodoj dum milito. Sekve en ĉi eksplodo kvanto da eksplodaĵo estas prenita precize tia, kiu sufiĉas por dispecigi teron, sed ne disĵeti ĝin; rezulte la dispecigita tero falas sur la saman lokon, kie ĝi estis, kaj anstataŭ kavo ni havas nur profunde kaj bone dispecigitan teron. La eksplodaĵo tie ĉi faras laboron de plugilo kaj erpilo samtempe, sed multe pli perfekte, ĉar ĝi "plugas" la teron profunde je unu metro. Tian "plugadon" oni, ekzemple faras por planti vinberojn.



La sekvanta bildo (3) prezentas jam mallertan desegnaĵon de via konversacianto, sed espereble ĝi estas sufiĉe klara por ilustri la priskribon de alia utila eksplodo. Vi scias certe, ke por starigi telegrafmaston necesas fari sufiĉe profundan kaj sufiĉe mallarĝan kavon. Ordinare tio tre malbone sukcesas, se oni laboras per ordinara fosilo — por elĵeti teron el profundo de la kavo fosata, vi nepre devas larĝigi ĝian supran parton kaj poste, kiam la masto estas enkavigita, vi denove devas plenigi la malplenan spacon per tero. Kaj jen la eksplodo povas elfosi bonan cilindroforman kavon, tute ne similan al funelformaj kavoj dummilitaj. Por tio oni traboras teron en necesa loko kaj enmetas en la boraĵon stangon kun kelkaj eksplodpatronoj fiksitaj sur ĝi. La eksplodaĵo en ĉiun patronon estas metata tiomkvante, ke ĝia eks-

plodo sufiĉu nur por dispremi la teron, sed ne por amase elĵeti ĝin (tion bone demonstras la moligita tero supre de la kavo — la eksplodo de la supra patrono sufiĉis nur por dicpecigi, moligi teron, sed ne elĵeti ĝin). Rezulte do aperas cilindroforma kavo de necesa profundo kaj preskaŭ samlarĝa, kiel la starigenda masto.

Kvankam mi riskas malbonigi la humoron de nia revu-administranto, kiu ne ŝatas tro multajn bildojn, tamen mi intencas fini la konversacion ankaŭ per bildo.

Antaŭ vi (bildo 4) kuŝas du aksoj kaj radpecoj de vagono. Kelkajn momentojn antaŭe la radoj tute trankvile kaj nerompite sidis sur la aksoj. Sed,



ĉar la radoj estis jam multe laborintaj kaj ne plu uzeblaj, fervoja administrantaro bezonis ilin depreni de sur la aksoj, dispecigi ilin por ke ili estu pli facile enmeteblaj en fand-fornon por refandigo, dum la aksoj estis ankoraŭ uzeblaj kiel tiaj por aliaj celoj. Ĉi taskon perfekte plenumis eksplodo: ĝi deĵetis la radojn, dispecigante ilin samtempe, sed lasis sendifektaj la aksojn. La kvanto da eksplodaĵo kaj ĝia alfikso nur la radon estis precize elkalkulebla por fari ĝuste tiun detru-laboron, sed ne pli grandan.

Mi ne scias, ĉu la legantoj miros pro miaj bildoj kaj pro la priskriboj ilin akompanantaj. Sed mi persone ne povas kaŝi mian propran grandan miregon:

Kial homaro malŝparas dum militoj preskaŭ senĉesaj tiun perfektan laborilon, tiun perfektan kaj taŭgan por paca laboro ilon, kia estas la eksplodaĵo!?

LABORLERNEJO — KIO ĜI ESTAS?

P. BLONSKI

LABORO KAJ LABOR-EDUKADO

Laborlernejo estas la lernejo de labora edukado. Sed koncepti la esencon de labora edukado ni povos nur, se ni antaŭe evidentigos la esencon de laboro ĝenerale.

La laboro estas tia procedo inter homo kaj naturo, dum kiu homo subigas naturon al sia volo, devigas ĝin servi por siaj bezonoj. En ĉi procedo homo aperas kiel estaĵo, suferanta certajn bezonojn kaj aganta pro kontentigo de ĉi bezonoj, kaj la objektoj kaj fenomenoj de naturo — aperas kiel akceptantaj, sub influo de homa agado, formon de konsumvaloraĵoj. La produktiva

laboro estas homa agado, transformiganta iujn objektojn en la objektojn, utilajn por homaro.

Tiamaniere la labora edukado konsistas en tio, ke infano planece kaj organizite ekzercas sin en celkonforma agado, kreanta el iuj objektoj la objektojn, utilajn por la homaro, t. e. havantajn konsuman valoron. Estante labor-edukata, la infano disvolviĝas, kiel estaĵo, kapabla devigi naturon servi por homaj bezonoj. La labora edukado estas la edukado de reganto super naturo.

Sed en laboro la plej karakteraj estas ne tiom la rezultoj de laboro t. e. la kreataj el objektoj konsumaj valoraĵoj, kiom la iloj kaj la metodo de laboro. Se oni parolas pri laboro — do antaŭ ĉio oni parolas pri la iloj kaj metodo de laboro, kaj en ili ni povas trovi la ŝlosilon por kompreni la esencon de laboro. En la historio de laboro la epokoj estas difinataj ĝuste per tio, kiaj estis la iloj de laboro kaj kiajn metodojn oni aplikadis.

Tiamaniere la plej esenca momento en la labora edukado estas la disvolvigo en la infano de scipovo utiligi ilojn de laboro. Ekposedante ilin, la infano ekposedas la rimedojn por subigi naturon al homaj bezonoj, ekposedas la ilojn por regado de homo super naturo. La esenco de labora edukado estas — disvolvigo de scipovo utiligi la ilojn kaj la teknikojn de laboro.

Evidentiginte la procedon de laboro, per tio sama ni evidentigos la celon, la esencon, la metodon kaj la sencon de labora edukado. La celo de labora edukado — disvolvigo en infano de scipovo krei el objektoj kaj fenomenoj de naturo la objektojn, utilajn por homaro. La esenco de labora edukado — infano ekposedas la ilojn kaj teknikon de laboro. La metodo de labora edukado — plane organizita ekzercado de infano en labora agado. La senco de labora edukado — edukado de forta homo, posedanta la ilojn por regado super naturo, kaj subiganta ĝin por utilo kaj bezonoj de homaro.

KOOPERADO KAJ LABORLERNEJO

Ni analizu ajnan laboron. Ĉarpentisto konstruas domon. Tiu ĉi laboro, la konstruado de domo, por unu homo ne estas laŭforta. Ĉe la konstruado laboras kelkaj ĉarpentistoj. La ĉarpentistoj povas aŭ ĉiuj kune fari la saman laboron aŭ ili povas dividi inter si la diversajn momentojn ĝiajn. La samo okazas ankaŭ ĉe multaj aliaj specoj de laboro. Tre ofte la laboro estas kolektiva agado, kooperado. Sed la laboro de ĉarpentisto estas nur unu el la sinsekvaj momentoj de diversspeca laboro super arbo, kiu komenciĝas ankoraŭ en arbaro dum hakado de la arbo kaj daŭriĝis en arbsegejo. Aliflanke, ĉe konstruado de domo estas okupitaj ne nur ĉarpentistoj, sed ankaŭ kolorigistoj, tegmentistoj ktp. Iam unu sama homo hakis arbojn, prilaboris ilin, konstruis domon, tegmentis ĝin ktp. Kaj nun ni observas komplikan kooperadon de la plej diversaj fakuloj. En disvolviĝinta socio la laboro ordinare estas kooperado de fakuloj. En la fina konsidero aparta laborulo fariĝas nur ero de la labora kolektivo.

Atentinte tion, ni povos pli klare prezenti al ni la esencon de laborlernejo. La izolita individua laboro en la disvolviĝinta socio aperas pli multe kiel abstraktaĵo. La labora edukado senevite supozas kolektivan laboron, alivorte – laboran kooperadon. La labora lernejo estas la infana labora kooperado.

La enhavo de laborlernejo devas esti ne la abstraktaj "laborprocedoj", sed ankaŭ la konkreta produktado en ĝia tuteco kaj ligiteco. Laborlernejo, samkiel ankaŭ la labora vivo de homo, baziĝas sur la tuteca viva tasko, sur la konkreta viva b e z o n o de homo pri loĝejo, vestaĵo, hejmilaro ktp. Kontentigo de ĉi bezono elvokas kolektivan laboron. Ĉi kolektiva laboro devigas la infanojn fari laŭ la ĝenerala plano unu saman laboron aŭ, plej ofte, komune dividi inter si la diversajn momentojn de ĉi laboro. Tiamaniere en la procedo de la dividado de laboro inter si dum la kontentigado de socia bezono la infanoj organiziĝas el infanoj-atomoj en la ligitecan kaj diferencigitan infanan labor-socion. La kolektiva laboro de infanoj organizas la laborlernejon, kiel

certan socian organismon, ĉar la laboro estas potenca organizanto de homaro, ĉu maturaĝa, ĉu malmultaĝa.

Finrezulte la laboro de ĉiu infano estas nur parto de la komuna kolektiva laboro, kaj mem li — nur ero de la labor-kolektivo. Per tio ĉi unuflanke estas atingata la socia edukado kaj la labor-disciplino, kaj aliflanke — la labora instruiĝo de infano, ĝia teknika lertiĝo, la maksimuma fakiĝo en la utiligado de diversaj, pleje perfektigitaj, instrumentoj.

Do, la labora edukado estas la socie-labora edukado. Laborlernejo estas la infana labora kooperado, la infana labora socio, organiziĝanta en la procedo de labordivido inter la infanoj por la pli sukcesa atingo de la unueca komuna celo. Kiomgrade ĉi laborlernejo unuiĝas per kolektiva laboro, tiomgrade la laborlernejo estas lernejo de socia edukado. Kiomgrade ĉiu membro de ĉi kolektivo teknike lertiĝas en la utiligado de diversaj iloj por diversa laboro, tiomgrade la laborlernejo estas lernejo de labora edukado kaj de labora klerigado.

INDUSTRIO KAJ LABORA KLERIGADO DE JUNULO

Industrio estas la maŝina maniero de produktado, t. e. tia labormetodo, dum kiu la ilo de laboro el la mana instrumento transformiĝas en mekanikan instrumenton de maŝino kaj ankaŭ la moviganto de ĉi labora mekanismo ordinare estas ne la homo, sed tiu aŭ alia naturforto. Industriismo, estante la supera venko de homo super naturo, estas karaktera por niatempa epoko.

Igante la muskolforton superflua, maŝinoj allasas la eblecon de malmultfortaj laboristoj, kaj laboro de junulo, kiel tion montris la sperto de kapitalisma industrio, estas teknike plene ebla dum la maŝina produktadmaniero. Eĉ pli, — nur en la industrio laboro de junulo povas esti la fonto de intensa kaj vasta klerigado.

La kaŭzo estas tiu, ke kvankam la laboro ĉe maŝino postulas kelkan spertiĝon, sed, dank' al unuforme-aŭtomata funkciado de la mekanismo, ĝi esceptigas la neceson de longedaŭra spertiĝotempo. La maŝina produktado ebligas relative rapidan transiron de la konatiĝo kun direktado de unu maŝino al la konatiĝo kun direktado de alia maŝino. Per tio sama ĝi ebligas la diversflankan laboran edukadón.

Sed la principo de industria produktado konsistas en tio, ke la komplika labora procedo estu mekanike kaj montrive malkombinita je siaj konsistelementoj. La observado de diversspecaj maŝinoj okulvideble demonstras la elementajn fundamentajn formojn de mekanismoj kaj movoj. Tiamaniere la diversflanka industria edukado venigas al aro da teoriaj asociigoj, al tio, kion oni povas, uzante la malnovan terminon, nomi la filozofio de industria tekniko.

Sed ĉi laboraj asociigoj estas nenio alia, ol la praktika aplikado de naturscienco. Nenie la interligo inter laboro kaj scienco aperas tiel reliefe kaj okulvideble, kiel nome en la industrio. La filozofio de industria tekniko, la industriaj asociigoj rektavoje en la regnon de scienco. En la industrio la teknika kaj la scienca klerigado estas proksime interligitaj.

Do, la supera labora klerigado estas la industria. La industria laboro, teknike atingebla por neplenaĝuloj kaj junuloj, donas ne la unuflanke-teknikan, sed la politeknikan klerigon. La industria politeknika lernejo kreas laborulonfilozofon kaj malfermas antaŭ li vastajn perspektivojn de integra science-teknika klerigo. Tiamaniere, la industrio — la supera atingo de la homaro en ĝia regado super naturo, aperas ankaŭ kiel la supera instruisto de junulo en lia tuteca politeknike-science-filozofia klerigado.

Do, la labora edukado preparas la estontan potencan reganton super naturo. La labora infana kooperado, t. e. la komenca labora lernejo, estas la fundamento de tia edukado en la infana aĝo, kaj la industria politeknika lernejo konstruas poste sur tiu ĉi fundamento sian programon de la efektive moderna labora klerigado de junulo el la industria XX-a jarcento.

El rusa lingvo trad. *G. P.*

UNS

Produktivgenossenschaft

Leipzig